

# Svisa Esperanto-Societo informas

jaro 2001 numero 1-a: januaro / februaro

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude GACOND

## Ĝenerala Kunveno Bern, 2001 aprile 7

La jarkunveno de SES okazos en Bern posttagmeze la sabaton 7-an de aprilo. Antaŭtagmeze kiel kutime kunvenos la aktivuloj por diskuti aktualan temon, ĉifoje pri la celaro kaj strategio de SES.

Proponoj al la Ĝenerala Kunveno estu senditaj ĝis fine de februaro al la prezidanto: Bruno GRAF, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen. Ili eniros la tagordon, nur se ili portas la subskribon de minimume tri SES-membroj, laŭ la statuta artikolo 19-a. Kompreneble ĉiu povas ĉiutempe fari sugeston al la estraro sen pliaj subskriboj.

La detalaj informoj aperos en la numero 2001-2 de "*SES informas*".

La prezidanto: Bruno GRAF

# Rememorigilo

## SES-estraro

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastrasse 23,  
3063 Ittigen/Bern. ☎: 031 921 44 59. Ret-  
poŝto: bgraf.o@bluewin.ch.

Perla MARTINELLI, Vicprezidanto, BP  
232, 6830 Chiasso. Retpoŝto:  
heroldo@tin.it.

Nicole MARGOT, sekretario, Chemin des  
Lys 4, 1010 Lausanne. ☎: 021 653 14 67.  
Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch.

Elisabeth LAUPER, kasisto, République  
13, 2300 La Chaux-de-Fonds. ☎: 914 39  
34. Retpoŝto: elilauper@bluewin.ch.

Dietrich WEIDMANN, kunlaboras en la  
informado, PF 301, 8034 Zürich. ☎: 01  
251 50 25. Retpoŝto: info@esperanto.ch.

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo  
2300 La Chaux-de-Fonds

## Anoncoj

Paĝo	Neesperantistoj & komercaj	Esperantistoj & nekomercaj
1/8	CHF 40	CHF 20
¼	CHF 70	CHF 35
½	CHF 110	CHF 55
1/1	CHF 180	CHF 90

## SES informas Redaktaj datlimoj

Por *SES informas* N° 2001-2  
(marto-aprilo): 20-a de februaro.

N° 2001-3 (majo-aŭgusto): 20-a  
de aprilo.

N° 2001-4 (septembro-oktobro):  
20-a de aŭgusto

N° 2001-5 (novembro-decembro):  
20-a de oktobro.

N° 2002-1 (januaro-februaro  
2002): 20-a de decembro 2001.

## Svisa kalendaro de la okazontaĵoj

<[www.esperanto.ch/kalendaro](http://www.esperanto.ch/kalendaro)>  
svisa esperanto-kalendaro en la reto

Ĉiu organizanto post fikso de  
dato tuj havigu ĝin retpoŝte al  
[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch) aŭ per ordinara  
poŝto al Esperanto-Societo Zürich,  
poŝtfako 858, 8034 Zürich.

Memkompreneble li sendu la  
koncernan sciigon ankaŭ al la  
redaktoro de "*SES informas*".

## KALENDARO

**2001 januare 08** Zürich publika informvespero

- 10 La Chaux-de-Fonds studrondo
- 12 ESZ ĝenerala kunveno Zürich
- 18 LES kunveno Luzern
- 20 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds
- 23 La Chaux-de-Fonds studrondo
- 27 KCE Asembleo La Chaux-de-Fonds
- 27-28 KCE monاتفino La Ch.-de-Fds
- februare 12** ESZ Ĝenerala Kunveno Zürich
- 14 La Chaux-de-Fonds studrondo
- 16 LES Ĝenerala Kunveno Luzern
- 16-22 KCE skiferio La Chaux-de-Fds
- 17 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds
- 24-25 KCE monاتفino La Ch.-de-Fds
- marto 13** La Ch-de-Fds studrondo
- 15 LES Kunveno Luzern
- 17 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds
- 27 La Chaux-de-Fonds studrondo
- 31 Asembleo de LF-koop La Ch.-de-Fds
- 31-aprile 1** KCE monاتفino La Chaux-de-Fonds
- aprile 07** SES kaj SAEF Ĝeneralaj Kunvenoj en Bern
- 12-16 KCE kurs-sesio La Ch.-Fds
- 13-17 SAT-Amikaro 56-a Kongreso en Chambéry (Francio)
- 19 LES Kunveno Luzern
- 20-22 49-a printempa staĝo Mulhouse
- 25 La Chaux-de-Fonds studrondo
- 28-29 KCE monاتفino La Ch.-de-Fds
- majo 10** La Ch-de-Fonds studrondo
- 17 LES Kunveno Luzern
- 19 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds

**24-27** KCE Internacia komunista konferenco La Chaux-de-Fonds

**26-27** KCE monاتفino en Rheineck

**junio 13** La Ch-de-Fonds studrondo

16 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds

21 LES Kunveno Luzern

**23-24** KCE monاتفino La Ch.-de-Fds

27 La Chaux-de-Fonds studrondo

30 LES Ekskurso Luzern

**30-julio 1** KCE monاتفino Ch-de-Fds

**julio 14-20** SAT 74-a Kongreso Nagykanizsa (Hungario)

**17-aŭguste 20** KCE kurs-sesio La Chaux-de-Fonds

**julio 21-28** UEA 86-a Universala Kongreso de Esperanto Zagreb (Kroatio)

**29-aŭguste 5** TEJO 57-a Kongreso Strasbourg (Francio)

**aŭguste 23** LES Promenada kunveno Luzern

**septembre 20** LES Kunveno Luzern

**oktobre 18** LES Kunveno Luzern

20 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds

**novembre 15** LES Kunveno Luzern

17: CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds

**decembre 05** LES Zamenhofa posttagmezo Luzern

15 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds

**2002 januare 18** LES Kunveno Luzern

Ne forgesu sendi viajn sciigojn ĝis la 20-a de februaro, por ke ili troviĝu en la kalendaro de "SES informas" 2001-2 (marto-aprilo 2001).

# Vivo de SES

## La Estraro informas

### Memorigo pri LF kaj Heroldo

- SES-membroj povas ricevi la gazeton "*Heroldo de Esperanto*" anstataŭ la revuon "*Literatura Foiro*" kontraŭ krompago de CHF 10.
- SES-membroj povas ricevi ambaŭ periodaĵojn "*Literatura Foiro*" kaj "*Heroldo de Esperanto*" kontraŭ krompago de CHF 30.
- La krompagoj estas ĝirendaj al LF-koop, poŝta ĉekokonto 12-11114-5, La Chaux-de-Fonds, kun klariga mencio.

Bruno GRAF

### Profitu de IS

IS = Interŝanĝa Servo de SES, kiu cirkuligas vid- kaj son-bendojn kaj gazetojn. Konatiĝu kun interesaj gazetoj, nekonataj de vi, ekzemple:

"*La Ondo de Esperanto*", soci-kultura revuo el Ruslando, po 12-foje jare.

"*Monato*", novaĵmagazino el Belgio, 12-foje.

"*Kontakto*", gazeto por gejunuloj kaj komencantoj, eldonita de TEJO, 6-foje.

"*Esperanto*", primovada organo de UEA, 12-foje.

"*Esperanto Aktuell*", organo de Germana Esperanto-Asocio, 6-foje.

"*L'Esperanto*", organo de Itala Esperanto-Federacio, 9-foje.

Kontaktu la peranton. Petu al li la liston de la vid- kaj son-bendoj. Profitu de IS.

Dieter ROOKE, Äussere Klus, 4702 Oensingen.

## Donacoj

Donacoj en CHF al SES :  
Yvonne AEBY, Genève: 20;  
Pierre-Alain BUBLIN, Genève: 5;  
Renate HEER, Bern: 50; Jeanne JEANNERET, Neuchâtel: 50; Jean-Jacques & Elianne LAVANCHY, La Tour-de-Peilz: 85; PARZIVAL, Biel: 20; Ivo PEDUZZI, Zürich: 5;  
Madeleine STAKIAN-VUILLE,

Onex: 10; Dietrich WEIDMANN, Zürich: 3. Sume: 248.

Donacoj en CHF por la Agado 2003: Anita ALTHERR, Bernex: 50; Andrée GACOND, La Chaux-de-Fonds: 10; Walter GIANNINI, Zollikerberg: 55; Daniel & Myriam SCHAUBACHER, Bern: 10. Sume: 125.

Nome de SES la kasist-ino Elisabeth LAUPER dankas tiujn donacintoj pro ties malavareco.

## Laborgrupo pri varbado

La laborgrupo pri varbado kunsidis la 9-an de decembro en Bern kaj diskutis ideojn por la jaro 2001. Ni volas stimuli vian agadon per kelkaj proponoj.

La Eŭropa Konsilantaro de Eŭropa Unio deklaris 2001 kiel jaron de lingvoj, dum kiu ni konsciiĝu pri la lingva trezoro en Eŭropo. La plej eŭropa lingvo estas verŝajne esperanto! Ni uzu la deklaron por informi pri la Lingvo Internacia.

## Publikaj prelegoj

Lastan aŭtunon Claude PIRON prelegis en la universitato de Genève antaŭ pli ol 100 personoj. Tio igas nin plani pliajn prelegojn spite de malfacilaĵoj. Vi povus oferti al societo aŭ lernejo prelegon pri la lingva situacio kaj esperanto. Depende de la dispon-

eblo povus paroli ekzemple germanlingve d-rino Ursula NIESERT, afergvidanto de GEA, Dietrich WEIDMANN, Bruno GRAF. Franclingve Mireille GROSJEAN, Claude PIRON, Claude GACOND. Ni petas vin ekzameni la eblojn en via regiono.

## Kursoj por gejunuloj

La 57-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Strasbourg de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto. Nia alvoko: Trovu gejunulojn, kiuj lernos esperanton cele al partopreno en IJK 2001. Estus por ili interkultura aventuro kaj samtempe interesa eksperimento, sub la signo de la lingva jaro. Via tasko estus organizi la kurson, kiu havus tute praktikan celon.

## Standagado

Stanislav POCHANKE sugestis disponigi materialon por standagado. La varbogrupo jesis tiun ideon kaj pretigas materialon, kiel tablotukon, presitajn afiŝojn, instruilojn, valizon, ktp. Se vi povas kontribui per ia objekto, prenu kontakton kun la kunordiganto, Patrick RENTSCH, Bachmatten 27, 4102 Binningen. ☎ 061 301 54 40. La materialo estu preta ekde julio, transportebla de loko al loko.

Bruno GRAF

## Esperanto? - Ja!

Kiel en la lasta numero 2000-5 de "SES informas" vi trovas nacilingvan informilon, kiun vi povas depreni kaj post tralego informcele donaci al konatulo. Kaj vi povas peti al ni la nombron de tiu folio, kiun vi konsideras necesa por informa agado. Tiuj informiloj celas krei ĉirkaŭ esperanto larĝan publikon da simpatiantoj. Tial

centre de nia bulteno ni provos regule havigi al vi novan specimemon de tiuj nacilingvaj folioj kun la espero, ke ili estos vastskale disvastigataj por konigi la kvalitojn de esperanto. Ekal kunordigita kunlaboro!

Claude GACOND

# Tutsvisa aktiveco

## CDELI

Centro de Dokumentado kaj  
Esploro pri la Lingvo Internacia  
Biblioteko de la Urbo  
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds  
☎ 032 967 68 55.  
Retpoŝto: <gacond@bluewin.ch>

## Raporto

La novembra studsabato grupigis 11 uzantojn de komputilo ĉirkaŭ André GROSSMANN veninta el Mulhouse por instrui, kiel eblas utiligi la supersignitajn literojn de esperanto ankaŭ en retmesaĝoj. Matene li klarigis helpe de retroprojekciado, kiel kodiĝas la

komputilaj karakteroj kaj el kio konsistas la riĉeco de Unikodo, kiu ekzistas en la Word-programoj. Kaj posttagmeze li instruis, kiel utiligi la makroojn, kiujn li kreis cele al la aŭtomata transformo de mesaĝoj skribitaj sen supersignoj, ĉu per la fundamenta h-ortografio, ĉu per la x-sistemo, ĉu eĉ per alia rimedo, al normale ortografiita lingvaĵo, kaj inverse. Ĉiuj povis ekzerciĝi kaj ricevi la koncernajn makroojn por ilin instali en la propran komputilon.

La partoprenantoj esprimis sian kontentecon kaj la deziron povi refoje profiti pri la konoj de tiu fakulo pri komputiko, kies instruo estas reale modela.

La decembra didaktika sabato grupigis 4 studemulojn, kiuj malgraŭ la proksimeco de la kristnaskaj tagoj ne hezitis veni. La fonologiaj opozicioj propraj al esperanto kaj rendezuo kun Zamenhof per liaj paroladoj estis la studtemoj.

## Venontaj studsabatoj

Claude GACOND senpage helpadas la studentojn kaj instruantojn de esperanto per la regula organizo de tiuj didaktikaj studsabatoj okazantaj principe ĉe CDELI la 3-an sabaton de la monato ekde la 10h00 ĝis la 12h45 kaj ekde la 14h15 ĝis la 16h00. Komuna tagmanĝo okazas en najbara italeca restoracio.

Jen la datoj de la venontaj studsabatoj :

2001 januare 20, februare 17, marte 17, majo 19, junio 16.

Ĉiufoje la partoprenontoj al studsabato bonvolu sin anonci ĉu letere, telefone aŭ rete. Tio faciligas al la instruonto la pretigon de la didaktika renkontiĝo.

Januare matene okazos dua rendezuo kun Karolo PICH kaj posttagmeze pretiĝo por instrui infanojn helpe de la legolibreto "*Esperanto por Infanoj*" aŭ "*Familio Muso*".

Claude GACOND

# KCE

Kultura Centro Esperantista  
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311  
2301 La Chaux-de-Fonds.  
☎ kaj fakso: (032) 926 74 07.  
<kce.esperanto@bluewin.ch>

## Raporto

En la decembra monاتفino Walter ZELAZNY komparis du leterojn de la iniciatinto de esperanto: tiujn de 1895 al N. BOROVKO kaj de 1901 al Antoni KOFMAN. La unua letero ĉefe gravas aŭtobiografie. La dua atentigas pri la noveco de esperanto mem. Estas rimarkinde, ke ZAMENHOF ne karakterizis sian lingvon per la adjektivo "helpa": li parolis pri lingvo "internacia" aŭ "neŭtrale homa". Por li esperanto ne nur faciligu la komunikadon, ĝi ankaŭ celu naski novan identecon al homarana humanismo. Per la "interna ideo", kiu akompanis la lingvon ekde la "*Unua Libro*" de 1887, esperanto distingiĝas de la ceteraj inventitaj lingvoj. Ĝi fariĝis karakteriza lingva fenomeno.

Claude GACOND, el raportoĵ

## Pri la Kultura Komisiono

Pasintjare, mi ne memoras ekzakte, kiam, sed antaŭ multaj monatoj, kiam KCE proponis al Nicole kaj mi re-aligi al la Kultura Komisiono, ni ambaŭ demisiis. Sed strange, en la posta numero de *"Heroldo de Esperanto"* aperis listo de la diversaj kunlaborantoj, kaj mi mire konstatis (sed nur semajnojn poste, ĉar mi preskaŭ neniam legas ĝin), ke ni plu estis inkluzivitaj. Ĉu vi bonvolu informi la legantojn de *"SES informas"*, ke la informo en *"Heroldo"* estas malĝusta, kaj ke ni ambaŭ ekzigis? Koran dankon.

Claude PIRON retmesaĝ al C. GACOND

## Venontaj aranĝoj

**2001 Januare 27-28**

Matene: Asembleo de KCE  
Fonetiko de esperanto laŭ aktualaj esploroj kun Daniele VITALI

**Februare 16-22** Skiferio kun François DEGOUL.

**24-25** Mia Danubo, mia amo kun Jan Stanislaw SKORUPSKI - vespere verda karnavaletto.

**Marte 31** Matene: Asembleo de LF-koop

**31 - Aprile 1** Lernu pli pri la kuracaj plantoj kun Stano MARCHEK.

**Aprile 12-16** Printempa Sesio de Plurnivela Internacia Kursaro, dua grado kun Stano MARCHEK, tria grado pri metodiko kun Stefan MACGILL.

**17** Printempa sesio de la Svisaj Esperanto-Ekzamenoj.

**28-29** Psikologio kaj nia ĉiutaga vivo kun Claude PIRON.

**Maje 24-27** Internacia komunista konferenco (responsas IKEK)

**26-27** Kristana kaj naturamika semajnfino ĉe Sunhejmo en Rheineck kun Hans KÄSTLI kaj Sonja BRUN.

**Junie 23-24** aŭ 30-1 julio Omaĝo al Gaston WARINGHIEN kun Michel DUC GONINAZ kaj Perla MARTINELLI.

**Julie 31 ĝis 20** aŭgusto Plurnivela Internacia Kursaro (PIK).

Detaloj estas regule publikigitaj en *"Heroldo de Esperanto"* kaj ankaŭ haveblaj ĉe la administrejo de KCE, CP 311, Postiers 27, 2301 La Chaux-de-Fonds. Tel/Fakso 032 926 74 07. Rete: [kce.esperanto@bluewin.ch](mailto:kce.esperanto@bluewin.ch). La administrejo ankaŭ prizorgas aliĝon kaj loĝadon de partoprenontoj.

Sonja BRUN



# SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj  
Gertrud Eggenberger, Wurmühlstr. 10  
8405 Winterthur ☎ 052 233 47 64

## Ĝenerala Kunveno

La ĝenerala kunveno de SAEF okazos matene la 7-an de aprilo en

Konferenzzentrum Galaxy en Bern antaŭ la ĝenerala kunveno de SES, kiu okazos posttagmeze.

La lasta numero 179-a de "*Svisa Fervojisto*" interese raportas kun fotoj pri la jubilea festo por la 75 jaroj de SAEF okazinta en Luzern la 7-an de oktobro.

# Loka aktiveco

## Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel  
☎ 0049 76 214 57 12  
Kunvenoj: 20h00 en Salono ĉe  
Haltingerstrasse 97

**Januare 25** 20h00 Ĝenerala Jarkunveno.

**Februare 22** 20h00 Fonduo ĉe Erna DÖRING.

**Marte 6** 19h30 Gässle.

**22** 18h30 vespermanĝo en la Restoracio Riehenhof, 20h00: David YAKI prelegos pri "Kiel vendi esperanton?"

## Genève

La heroaj jaroj de  
Radio Genève

Pretigante elsendon pri la fondo de "Radio Genève" en 1925 la verkisto Michel BERETTI imagis dokumentan fikcion, kiu raportu pri la historio de "*Ici Genève!*" inter 1925 kaj 1948. Li imagis tipan familion PERRIN, kiu unue malfidis al la nova esprimilo, sed baldaŭ ne povis plu vivi sen radio. Verkante sian teatraĵon Michel

BERETTI malkovris la decidigan rolon de Edmond PRIVAT kaj de la esperantistoj. Tial li venis dokumentiĝi en la arkivaro Edmond PRIVAT en la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, kie li aŭdis pri la ekzisto de CDELI. Baldaŭ poste li direktis al mi la aktorajn devontaj ludi la rolon de PRIVAT kaj de esperantisto, por perrete ricevi esperantigon de la dirotaĵoj kaj pertefone instruon el-parolan.

La duhoran teatraĵon disaŭdigis "Espace 2" en la elsendo "Entre les lignes" la sabaton 9-an de decembro ekde la 18h05 ĝis la 20h00. Ĝi vigle menciis la fandan rolon de la esperantistoj. Ĉiuj povis aŭdi kiel prononciĝas esperanto. Kaj fine de la elsendo mia nomo estis bone aŭdigita, kiam temis danki al la kunhelpantoj al la elsenda realigo.

Krome mi estis invitita al spektaklo, kiu disvolviĝis la lundon 11-an de decembro en la "Maison de la Radio" en Genève. Tre plaĉa etoso regis okaze de tiu teatra prezento, kien mi rajtis veni kun 8 invititoj. Ilin mi unue renkontis por agrabla kunmanĝado en najbara restoracio. Kaj post la teatra prezento ĉiuj estis invititaj kuncelabri la feston "Escalade" per gustumo de tre bona legom-supo akompanata de fromaĝo kaj

de la kaldrono ĉokolada, kies rompo kreis bonan desertaĵon. Okaze de tiu festa teatraĵo kaj de la posta bankedo estis plurfoje vigle diskonigita kaj la rolo de esperanto kaj la ĉeesto de nia esperanta grupo.

Claude Gacond

## Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20  
☎ 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon en la restoracio «Aux Cheminots», 7, rue des gares, Genève.

## Raporto

La decembra numero 2000-10 de "Brasikfolio" per humurplena raporto de Anita ALTHERR rakontas pri vigla etoso reginta okaze de la decembra kunveno, en kiu David YAKI klarigis, kiel oni vendu esperanton! Ĝi ankaŭ rememorigas, kiel Andres BICKEL bone progresadis en la praktiko de esperanto dum la 14-a skiferio en Adelboden en la vintro 1970-71.

**Februare 6** Babilado kaj pretigo de la Ĝenerala Jarkunveno.

**Marte 6** Ĝenerala Jarkunveno, kiun ĉiuj devus partopreni por subteni la malmultajn membrojn, kiuj klopodas plu vivteni "La Stelo".

**Aprile 3** Programo decidota.

Maje 1 Programo decidota  
Junie 5 Programo decidota

# Lausanne

## Esperanto en liceo EPSIC

Laŭ retmesaĝo de Edmond LUDWIG en Stosswihr (Francio) ni ricevis la informon, ke de kelkaj semajnoj kopio de la TTT-paĝoj pri RAKONTU AL MI LA RADION de Pierre DESSAPT estas instalita sur la interna reto de la teknika liceo EPSIC en Lausanne, inkluzive de la versio en esperanto. Do pli ol 2600 lernantoj povas tralegi la francan kaj esperantan versiojn kaj povas samtempe akiri informojn pri esperanto. Por ke legantoj de nia bulteno "SES informas" povu konsulti tiun ĉi TTT-paĝon de la liceo, jen ĝia troveblo:

<http://www.epsic.ch/Branches/Audiovideo/index.html>

## Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale : 389, 1009 PULLY

☎: (021) 729 58 02

<lausanne.ch @ esperanto.nu>

<<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00

Diskuta rondo: ĉiulunde ekde la 19h30 ĝis la 21h00 ĉe François RANDIN, Vallombreuse 14, kiam ne okazas kunveno en la stacidomo.

## Raporto

Kiel vendi esperanton profesie? Laŭ tiu ĉi titolo ni renkontiĝis la 6-an de novembro kun David YAKI. La dialogo estis tiel vigla, ke li apenaŭ povis plenumi sian prelegtemon! Ni unue listigis la argumentojn, kiuj malhelpas la disvastigon de esperanto. Tuj temis pri la angla (jam internacia), pri esperanto artefarita, ne utila, sen kulturo, seksista (!), aŭ pri la ofta argumento: "Mi ne havas tempon", aŭ "Mi ne havas konvenan eblon lerni ĝin". Sed la resumo de ĉio estas nescio.

Jen nepraj kvalitoj de bona vendisto: 1. laboro, 2. entuziasmo, 3. vendlerteco

François RANDIN aldonis, ke por tio ne necesas scii esperanton. Fakte li pravas.

Tamen ni devas esti pretaj aĉeti tion, kion ni vendas!

Lernu eviti disputon, ĉar se vi gajnas ĝin, vi perdas la vendon. Por esti efika:

1. komprene la demandon, re-diru, kion vi komprenis por certigi.
2. traktu la demandon per taŭga mallonga respondo.
3. fermu la aferon petante konsenton de via demandinto.
4. denove aŭskultu.

Ekzemplo de taŭga respondo kontraŭ la argumento, ke esperanto estas artefarita:

1. Se mi bone komprenas vin, vi opinias, ke esperanto ne povas funkcii, ĉar kreita de homo antaŭ nelonge?

2. Sed aŭtomobilo ankaŭ estas artefarita ĉevalo elpensita de geniulo antaŭ nelonge. Tamen ĝi bone funkcias kaj veturigas nin ien ajn! Same por esperanto!

Anstataŭ "prelegi" (argumentadi), starigu demandojn. Kaj memoru, ke ili aĉetos ne pro tio, kion vi diris, sed laŭ tio, kion ili diros al si mem.

François RANDIN asertas, ke la ĉefa malhelpo por la disvastigo de esperanto estas manko de mono por informiloj, lernolibroj, kaj ĉefe por pretigi kaj dungi taŭgajn instruistojn.

Bona sperto de David YAKI: vendado de esperanto-gazetoj, "Pasporta Servo", ktp. ĉe informtablo pri esperanto. Kaj li alparolas kelkajn:

- Ĉu vi jam aŭdis pri esperanto?

- Ĉu vi konas esperantistojn?

Lia ĉefa celo: ke plejmulte da personoj aŭdu almenaŭ unufoje, ke esperanto estas lingvo, internacia, facila. Tio estas eta semo por iam poste.

Indas, ke ni realigu lian revon!

Nancy FONTANNAZ

## Venonta rendevuo

Februare 5 20h00: Ĝenerala Asembleo.

# Luzern

Lucerna Esperanto-Societo  
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke  
☎ 041 280 46 12.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg, Ettiswil-Ruswil kaj de Neuenkirch.

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - okazas paroliga kunveno de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz Brügger en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

## Programo 2001

Januare 18 ĵaŭde 14h00:  
paroliga leciono, 14h30: "Kiel vendi esperanton?" kun David YAKI el Kanado.

Februare 07 en Simplon.

16 vendrede 20h00: Ĝenerala kunveno.

Marte 07 en Simplon kun Franz BRÜGGER.

15 ĵaŭde 14h00: paroliga leciono, 14h30: Impresoj pri Pollando kun Louise BACHMANN.

Aprile 04 en Simplon.

19 ĵaŭde 19h30: paroliga leciono,  
20h00: Historio kaj principoj de  
Bahaismo kun Rosa METTLER.

**Maje 02** en Simplon.

17 ĵaŭde 19h30: paroliga leciono,  
20h00: Biografietoj de famaj  
komponistoj kun Paul SCHERER.

**Junie 06** en Simplon.

21 ĵaŭde 19h30: paroliga leciono,  
20h00: Demandluda ekzameno pri  
la Originala Verkaro de  
ZAMENHOF kun Dieter ROOKE.

**Junie 30** sabate: Ekskurso kun  
Anĝelo MELLINI.

**Julie 04** en Simplon.

Aŭguste 23 ĵaŭde 19h00:  
kolektiĝo ĉe "Emmenbaum" por  
promenado kaj poste humura  
literaturo kun Soja BRUN.

**Septembre 05** en Simplon.

20 ĵaŭde 19h30: paroliga leciono,  
20h00: Infanoj kaj bestoj kun  
Monika RUCKLI.

Oktobre 18 ĵaŭde 14h00:  
paroliga leciono, 14h30: Historio  
kaj fabrikado de salo kun Annelis  
DETLING.

**Novembre 07** en Simplon.

15 ĵaŭde 14h00: paroliga leciono,  
14h30: kompilado de la programo  
2002.

**Decembre 05** merkrede  
14h00-16h00 en Simplon:

Zamenhofa posttagmezo kun  
Franz BRÜGGER kaj Sonja BRUN.

**2002 Januare 09** en  
Simplon.

18 vendrede 19h30: paroliga  
leciono, 20h00: Vojaĝo tra  
Venezuelo kun Margrit E.  
BRÜGGER.

## Kantono de Neuchâtel

Studaj rondoj ĉe CDELI  
La Chaux-de-Fonds

Ĝenerale je la 2a kaj 4a merkredo de la monato  
de la 20h00 ĝis la 21h45 kun Claude GACOND.  
Marde okaze de koncerto la merkredon.

Venontaj kunvenoj

Plenkreskuloj:

2001 januare 10 kaj 23

februare 14

marte 13 kaj 28

aprile 25

majo 10

junie 13 kaj 27

Geknaboj:

Regule la mardon de la  
17h00 ĝis la 17h45.

# Wil

## Esperanto-Klubo Wil

Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70,  
9500 Wil. ☎ 071 911 68 30

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato  
je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Sântis-  
strasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

**Januare 3** Renkontiĝo kun  
Ernst VON MAY en la Flegodomo

Sonnmat-Niederuzwil, do ne en la  
Restoracio Blumeneck.

**Februare 7** Ĝenerala Kun-  
veno.

**Marte 7** Provleciono de  
esperanto por ĉiuj interesatoj kun  
Verena CHAVES-WALDER.

## Esperanto-Societo / Esperanto-Gesellschaft

# Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH ☎ 01 251 50 25  
<info@esperanto.ch>

## Programo

8-an de januaro, lundon, Esperanto-  
Librejo, Akazienstr. 6

19.30: Konversacia rondo por pli-  
bonigi la lingvan nivelon - por  
komencantoj kaj progresantoj.

**20.00: Publika informvespero**

18-an de januaro; ĵaŭdon,  
Esperanto-Librejo, Akazienstr. 6

20.00: Komenco de komencanta  
kurso

13-an de februaro, lundon,  
Esperanto-Librejo, Akazienstr. 6

19.30: Konversacia rondo por pli-  
bonigi la lingvan nivelon - por  
komencantoj kaj progresantoj.

8. Januar 2000, Montag, Esperanto-  
Buchladen, Akazienstr. 6

19.30: Konversationsrunde zur Ver-  
besserung des Sprachniveaus für  
Anfänger und Fortgeschrittene

**20.00: Öffentlicher Informations-  
abend**

18. Januar 2000, Donnerstag  
Esperanto-Buchladen, Akazienstr. 6

20.00: Beginn Anfängerkurs

13. Februar, Montag, Esperanto-  
Buchladen Zürich, Akazienstr. 6

19.30: Konversationsrunde zur Ver-  
besserung des Sprachniveaus für  
Anfänger und Fortgeschrittene

20.00: Ĝenerala kunveno  
Tagordo laŭstatuta, specialaj tag-  
orderoj: partnereco kun Kunming,  
buĝeto por varbado

20.00: General-versammlung  
Tagesordnung gemäss Statuten.  
Besondere Punkte: Partnerschaft mit  
Kunming, Werbebudget

# Raportoj

## Memorinda kristnasko

Retmesaĝe Claude PIRON tiel  
rakontis siajn kristnaskaj tagojn:

*Niaj aventuroj: Nia kristnaska  
periodo estis neordinara. La 24-  
an de decembro, je la kvara  
matene, Nicole kaj mi staris sur  
nia balkono de la tria etaĝo en  
malvarmege kaj fumego, dum for-  
brulis apartamento unua-etaĝa.  
Post dek kvin minutoj la fajro-  
brigado alvenis, kaj ni malsupren-  
ŝtupis laŭ la granda ŝtupetaro.*

*Feliĉe neniu el la loĝantoj  
sufervis ion ajn fizike, kaj nekred-  
eble bonŝance nia apartamento ne  
sufervis pro la akvo. Sed ĝi  
ankoraŭ odoras je fumo.*

*Kaj la sekvantan tagon, la 25-an,  
do dum Kristnasko, nia plej juna  
filino komencis senti la streĉojn  
de nasko, dum ŝi venis rigardi la  
staton de nia apartemento. Ŝia*

*dua filo, Samuel, naskiĝis je la  
21h12. Ĉio tre bone disvolviĝis  
(ni teorie atendis la naskon nur  
por la 4-a de januaro, sed ni  
kompreneble sciis, ke tian daton  
oni ne prenu serioze). La kompat-  
inda etulo havos samtage naskiĝ-  
daton kaj kristnaskon!*

Al Samuel kaj ties gepatroj kaj  
geavoj ni deziras feliĉigan 21-an  
jarcenton. Kaj ni mem feliĉas, ke  
nia esperanto-verkisto ne travivis  
detruon de sia grava dokumentaro  
dum la lasta kristnasko de la 20-a  
jarcento! Tiel li povos daŭrigi sian  
redaktan aktivecon sen paneo.

Claude GACOND

# Staĝo en Bouresse

18-22-ajn de aprilo 2000

Saluton! Yvette

Saluton! Marguerite

Malproksime tuj aperas je la sesa kaj duono la tri lumoj de la trajno. Nia trajno! Rapide, ni eniras la vagonaron, kiu staras sur la kajo.

Ni elektas fenestrolokojn.

La naturo vekigigas. Ni ĝojas pri la bela mateno.

Ni decidis paroli esperante dum la tuta vojaĝo, dum la tuta tago. Bone! Bone! Nenia dogano. La trajno rapidas pli ol nia interparolado. Ni serĉas malfacile la precizajn nomojn, kaj verbojn. La parolado estas nek interesa, nek pasiiga! Dum la ĝusta momento eniras nian kupeon ĉarma krokodileto, kiu ĝentile salutas nin kaj senkulpiĝante sidiĝas inter ni; li parolas, paroladas. Ni tiel bone aŭskultas lin, ke ni preskaŭ forgesas niajn belajn promesojn.

Parizo! Jam? Rapide ni eliras la vagonon kaj serĉas taksion por atingi la Montparnasse-stacidomon.

Post bela vojaĝo tra la kamparo franca la trajno haltas en Poitiers. Tie, supre de la elirŝtuparo staras granda sinjorino tenante enmane kartan tabuleton. Estas por ni.

La afabla sinjorino petas nin eniri sian veturilon. Post unu horo ni

atingas Bouresse kaj povas saluti niajn geamikojn kaj la estontajn gelernantojn.

Estas tre amike. Hela kaj agrabla estas nia ĉambro.

La Esperanta Centro konsistas el pluraj domoj ĉirkaŭ bele florita herbejo. Tie la vivo estas simpla kaj kora. Granda manĝoĉambro kun du tabloj, multaj seĝoj kaj taburetoj gastigas ĉiujn. La manĝo estas servita en grandaj pladoj. Preskaŭ ĉiufoje la teleroj rondiras ĝis unu el ni, kiu ŝatas roli la familian patrinon. La manĝo ĉiam sufiĉas kaj bongustas.

Pluraj ĉambroj pretas gastigi la gelernantojn por la kursoj.

Yvette kaj mi kredante, ke la unua grado estos tro facila por ni, ni forlasas gekomencantojn kaj atingas la ĉambron de la dua grado.

Tre interesaj estas la diversaj kursoj. Dum la tuta semajno ni kuraĝe studadas la diversajn malfacilaĵojn de la esperanta lingvo: prepoziciojn, sufiksojn kaj prefiksojn; ni aldonas ĝustan finaĵon al akuzativaj vortoj; ni studas la malfacilajn vortojn "pri-per-propor" kaj la famajn "ig" kaj "iĝ".

Post la granda cerbolaboro la vido al la belega, rozkolora florita azaleo de la korto kaj taso da varma teo refortigas nin.



Jen la grava ekzamentago; ni preskaŭ pretas por alfronti la dua-gradan ekzamenon.

Yvette kaj mi iras senhezite enskribiĝi. Sed... Georges LAGRANGE petas al ni la ateston de la unua ekzameno.

- Ĉu ni havas ĝin? Ne? Nu, tiam vi devos fari la unuan, se vi volos ekzameniĝi.

Tiel ni faros!

Iom malfieraj ni estas.

Sed baldaŭ revenas al nia koro la ĝoja penso: Se ni bone laboros ni revenos al Bouresse la venontan jaron. Ni revenos por la dua. Hura!

Marguerite JACCARD

(El la oktobra "Informilo" 2000-7 de Laŭzana Esperanto-Societo)

## Esperanto-Centro Kvinpetalo

Rue du lavoir, FR-86410 Bouresse  
Tel. kaj fakso: 0033 549 42 80 74  
<kvinpetalo@clubb-internet.fr>

(Petu la detalan kurs-informilon kun la partoprenarifoj)

2001 februare 20-24 Praktikado de la lingvo (2-a grada ekzameno) kun Josée LAFOSSE.

27 - marto 3: Iberia skolo: novelistoj, poetoj, kun Georges LAGRANGE.

aprile 8-12: Preparado al la ekzameno Kapableco kun Pierre ROYER kaj Georges LAGRANGE.

17-22: Historio de la lingvo esperanto, didaktikaj konsiloj al instruantoj kaj studentoj kun Claude GACOND. (Grave por la parola parto de la ekzameno Kapableco)

## 10-a Konferenco de *Gesellschaft* *für Interlinguistik* Berlin, Novembre 17-19

La 17-19-ajn de novembro okazis en Kastelo Glienicke (Wannsee) en la okcidenta parto de Berlin la 10-a GIL-konferenco. GIL estas mallongigo por "*Gesellschaft für Interlinguistik*" ("Societo por Interlingvistiko"). Ĉi tiu asocio estis fondita en 1991 en Berlin kaj estas prezidata de d-ro Detlev BLANKE. (Noto: 1)

Fakte, GIL estas la daŭrigo de la en 1971 starigita Komisiono pri Interlingvistiko kaj Esperantologio kadre de Kulturligo de Germana Demokrata Respubliko. GIL estas leĝe registrita kaj ŝtate agnoskita kiel komunutila asocio, kiu havas du principajn agadkampojn, respektive celojn: 1. kolekti kaj aktivigi interlingvistike respektive esperantologie kompe-

tentajn kaj interesatajn koleg-  
(in)ojn (internen direktita ago-  
kampo) por trakti interlingv-  
istikajn temojn sur scienca nivelo,  
2. kaj reprezentu la fakon inter-  
lingvistiko en la nacia (kaj inter-  
nacia) lingvistika medio (eksteren  
direktita agokampo).

Sub "interlingvistiko" GIL  
komprenas la sciencan disciplinon  
(aŭ kampon), kiu esploras la inter-  
nacion lingvan komunikadon kun  
ĉiuj ĝiaj aspektoj. Tio inkludas  
etnajn lingvojn kaj planlingvojn  
(inter tiuj aparte esperanton) aŭ  
aliajn elpensitajn lingvojn kiel  
internaciajn komunikilojn. Gravus  
substrecki, ke GIL komprenas sin  
kiel neesperantistan organizon. La  
konferenca lingvo de GIL, kiu  
estas neŭtrala rilate al la plan-  
lingvaj sistemoj, kutime estas la  
germana, kvankam ankaŭ aliaj  
lingvoj estas uzablaj.

Por fariĝi membro de GIL  
necesas aliĝpeto al la estraro, kiu  
akceptas (aŭ malakceptas) la  
peton. Nuntempe GIL nombras 65  
membrojn, precipe lingvo-scienc-  
istojn. El Svislando membras en  
GIL d-ro Tazio CARLEVARO kaj  
Andy KÜNZLI.

GIL eldonas la bultenon "*Inter-  
linguistische Informationen*" (mal-  
longigo *Intl*) je po kvar kajeroj  
jare kaj publikigas la prelegojn de

la fakprogramoj en kromkajeroj  
(*Beihefte*).

Pli pri GIL kaj ties statuto oni  
povas legi krom en *Intl* interalie  
en la nova periodaĵo "*Esperant-  
ologio – Esperanto Studies*",  
kajero 1, 1999 (redaktoro Christer  
KISELMAN).

GIL estas rete atingebla sub la  
adreso:

<http://user.berlin.de/~gil.berlin/>.

## Ĉi-jara programo de GIL

Ĉi-jare la kadra temo de la  
konferenco estis dediĉita al la  
strukturo de diversaj planlingvaj  
sistemoj, konataj kaj malpli kon-  
ataj. La "naturalisman" parton  
traktis d-ino Vera BARAN-  
DOVSKÁ-FRANK el Paderborn  
(Latino sine flexione), profesoro  
Otto BACK el Vieno (occidental)  
kaj Peter LIEBIG el Leipzig, kiu  
estas reprezentanto de "Union  
Mundial pro Interlingua" (GODE).  
Invitita prelegi estis ankaŭ Günter  
ANTON el Köthen, prezidanto de  
"Uniono por la Linguo Inter-  
naciona (ido)". La temon "natural-  
ismo kaj aŭtonomeco en plan-  
lingvoj laŭ la ekzemplo de la  
frazologio" prezentis d-ino  
Sabine FIEDLER el Leipzig. De ĉi  
tiu germana fakulino pri  
frazologio en planlingvoj (kaj en  
esperanto) cetere ĵus aperis ŝia  
habilitacia verko (Sabine

FIEDLER, *"Plansprache und Phraseologie: Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto"*, Peter LANG 2000, DM 98).

La ceteraj kontribuoj koncernis jenajn temojn:

En sia struktura komparo de esperantidoj kaj la lingv(istik)a kritiko de esperanto, Claus J. GÜNDEL el Eschweiler <[www.clages.de](http://www.clages.de)> raportis pri la aktuala stato de la diskuto de kelkaj esperantistoj en interretaj novaĵ-grupoj (v. „esp-novo“ sub <[www.egroups.com](http://www.egroups.com)>, kiuj deziras reformi esperanton. Ekzemple li montris ideojn pri kelkaj novaj afiksoj en esperanto, kiujn la novaĵ-grupo pridiskutas aŭ sugestas por enkonduko. En la historio, la adeptoj de la planlingva ideo ne nur ŝatis ĉiam de nove mem krei novajn planlingvojn, sed ankaŭ daŭre reformi ilin. Tial komence de la 21-a jarcento ni nombras proksimume 1000 planlingvajn sistemojn respektive projektojn.

La lingvoprojekto „Loglan“ estis prezentita de Ulrich FELLMANN, Frankfurt/Main. Ĉi tiun „logikan lingvon“ komencis kompili d-ro James COOKE BROWN en Usono ekde 1955; ĝi estis publikigita en 1960 en "Scientific American" kaj trovis nemalmultajn adeptojn inter

usonaj natursciencistoj kaj matematikistoj. La leksiko de Loglan, klasifebla pure apriora, fontas je la materialo de la 8 plej disvastigitaj nacilingvoj en la mondo; ĝia gramatiko sekvas la principojn de la simbola logiko. La pluevoluigata varianto de Loglan nomiĝas "Lojban", kiu ekde 1987 estas propagandata de "The Logical Language Group".

La kerno de la prelego de d-ro Werner BORMANN el Hamburg sub la moto „La lasta instanco - kiu decidas pri la ĝusteco de planlingvaj esprimoj?“ koncernis la demandon, en la kazo de esperanto kompare kun interlingua, kiu persono aŭ kiu instanco kompetente decidu(s) pri ĝusta esprimo aŭ termino en iu faka kampo. Ĉiu tiu afero fariĝus ege aktuala kaj grava, se ekzemple iam iu planlingvo ludus eventualan rolon en EU.

Laste, d-ino Cornelia MANNEWITZ el Rostock enkondukis la partoprenantojn en la aspektojn de la komunikado inter teranoj kaj la estaĵoj el la kosmo. Pli proksime ŝi montris diversajn komunik-situaciojn kaj rimedojn el kelkaj sciencfikciaj filmoj. Krome ŝi parolis pri la klingona lingvo, ĉar tiu ĉi lingvo fakte fariĝis certgrade sciencfikcia kultlingvo. La klingonan lingvon, cetere aparte

malfacilan, elpensis iu usona lingvisto por la kosma gento de la klingonoj. Kiel konate, la klingonoj estas agresema fripona tribo en la kosmo, kiu batalas kontraŭ la spacoŝipo "Enterprise".

Tiel, la 10-a GIL-konferenco tro rapide finiĝis. La 11-a GIL-konferenco estas fiksita por la 23-25-aj de novembro 2001 en la sama loko.

Post la konferenco mi havis la okazon, kadre de la "lingvo-foiro" Expolingua en Berlin, ĉeesti publikan prelegon de Detlev BLANKE pri la temo "Serĉante universalan lingvon – inter utopio kaj realeco". Ĉeestis proks. 20 interesitaj personoj, inter ili multaj gejunuloj.

